Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 1 - 2016

# Espéranto en Marche

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

BN : Legu la Bultenoj EeM 2015 en A4-formato ĉe http://esperanto-wallonie.be/

## *Enhavo*

Paĝo 2 : Kunvokilo : Ĝenerala Asembleo de BEF (Loverval 19/03/16)
Paĝo 3 : Protokolo de la pasinta ĜA de BEF en Dilbeek ( 14/03/2015).
Paĝo 4 : " " " " " "
Paĝo 5 : Fabrikado de la Bulteno EeM.
Paĝo 6 : " " "
Paĝo 7 : PEKO 2016 : 4-8/05/2016 en « La Marlagne ».
Paĝo 8 : Eventoj : Grésillon ; IFEF-Kongreso en Varna ; NitraUK.
Paĝo 9 : Bestaj blekoj.
Paĝo 10 : Informoj pri Esperanto en Belgio kaj Internacie.
Paĝo 11 : Informoj pri Esperanto en Valonio.
Paĝo 12 : Kotizoj 2016 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.

*************************************************

Editeur responsable: Claude Glady
Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE
071/64 49 16 cglady@arcadis.be

**Agrablan kaj feliĉan Novan Jaron 2016 !**
**NE FORGESU PAGI VIAN KOTIZON AL APE.**
**Se vi ne ankoraŭ pagis, bankĝirilo estas ene.**
**Tiu Bulteno estos la lasta sen via BUL-krompago !**

# BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)


Fédération Belge d'Esperanto
Belgische Espererantofederatie

BELGA ESPERANTO FEDERACIO

Defakta Asocio aliĝinta al UEA
Ĉe la sekretario : Claude Glady
Rue du Culot,1 -
B-5630 CERFONTAINE
0032-(0)71-64491
cglady@arcadis.be


## VENONTA ĜENERALA KUNVENO DE BEF: 19/03/2016

**La Ĝenerala Asembleo de BEF okazos en LOVERVAL**
**Sabaton, la 19-an de marto 2016, je 13h30**
**CENTRE ADEPS (BLOSO) : "Ferme du Château"**
**Allée des Sports 12 B-6280 LOVERVAL 071/601160**

**TAGORDO :**

1) Enkondukaj vortoj de la prezidantino kaj de la vicprezidanto.
2) Organizado de la Protokolo kaj de la listo de ĉeestantoj.
3) Aprobo de la raporto de la ĜA de BEF (14-an de marto 2015)
4) Financa Raporto.
5) Funkciado de BEF .
6) Informado pri la agadoj de FEL / APE / EBG / BEFA / ILEI / kaj Aliaj ...
7) Rilatoj kun UEA kaj EEU.
8) Verdaj Skoltoj
9) PEKO 2016
10) Eksteraj agadoj ,.....
11) Internaciaj agadoj.
12) Komitata malŝarĝo.
13) Administrantaro – Kandidatoj – Elektoj.
14) Diversaĵoj.

La Sekretario
Claude GLADY

NB : Bonvolu informi ĉiujn interesatulojn… Dankon !
Ĉiuj samideanoj estos bonvenaj.


Flory : 059-702914 flory2@witdoeckt.be
Marcel : 071-431413 0476/201273 mardelforge@brutele.be
Eric : 02-3848223 ericbaert@skynet.be
Claude : 071-644916 0485/914659 cglady@arcadis.be

# BELGA ESPERANTO FEDERACIO

**aliĝinta al UEA**
**defakta asocio**

## ĜENERALA ASEMBLEO DE BEF

**Dato : Sabaton, 14-an de marto 2015. Je 13h30..**
**WESTRAND, Kamerijklaan 46, Salono 302 BE-1700 DILBEEK 02/466 20 30**

**Ĉeestas 11 partoprenantoj : Flory WITDOECKT (BEF), Marcel DELFORGE (BEF), Eric BAERT (BEF), Claude GLADY (BEF), Marc CUFFEZ (FEL), Walter VAN DEN KIEBOOM (FEL), Marc DEMONTY (EBG), Bernadette PONCELET (APE), Clara BRACKE (BEFA), SPARENBERG Jean-Pol (APE-VS), Valère DOUMONT (APE-VS)**

**Senkulpiĝis :, Eddy RAATS, Francine SPERBER, André DEMARQUE, Katja LODOR, Hans DELNAT, Bart DEMEYERE**

**Prezidas: Flory WITDOECKT (Prezidantino). Marcel DELFORGE (Vicprezidanto).**
**Protokolas : Claude GLADY (Sekretario). La listo de ĉeestantoj cirkulas.**

**BN : La Asembleo penas komenci ĉar pluraj partoprenantoj alvenas malfrue pro busa malfacilaĵo por atingi la kunvenejon, kaj precipe ĉar mankas la Prezidantino. Pro trajn- kaj busproblemoj, Flory kaj Walter telefone avertas ke ili nur povos alveni prokraste. Ni decidas (ebla prokrasto da 100 minutojn por Flory !) tamen iom komenci la kunvenon, per kelkaj punktoj de la tagordo. atendante la Prezidantinon por la aliaj.**
**Sed evidente, tio multe perturbos la tagordon kaj precipe la protokoliston.**

**3) <u>Raporto de la ĜA de BEF (23/03/2014)</u>: Nur kelkaj rimarkoj.**
**Pri punkto 6 : La konstruaĵo de FEL ne apartenas al FEL sed al la Institucio Hodler, kiu deziras rapide trovi monon, kaj do intencas vendi ĝin. Tiel estus risko por la Grafika centro kun demisio de la presisto.**
**Pri punkto 7 : Flory klarigos tion post ŝia alveno : Por tiu projekto de la Eŭropa Komisiono, ni estas 9 partneroj, kiuj devas pagi 133.000 €, laŭ la grandeco de la landoj. Rilate EEU, ĉiuj partoprenantoj bedaŭrinde ne pagas. Feliĉe ekzistas malavaraj mecenoj. La agado finiĝis, kaj ni esperas ke ĉio estas akceptebla : ĝi funkcias en 25 lingvoj (la oficialaj + la rusa + Esperanto). Ni poste devos propagandi al ĉiuj : grupoj, instancoj. Ni vere povas diri ke, tio ebliĝis dank'al Esperanto.**

**4) <u>Financa raporto far Eric Baert</u> : Kelkaj rimarkoj. Li memorigas la principon por donaco de mono : La riĉaj eŭropaj landoj helpas la malriĉajn. Oni vidas 170 € por Kipro. Flory klarigos la aferon.**
**Ĉu ni denove devas helpi BEFA-n per 400 € ? Ŝajnas ke ne ! Aliaj pli bezonas.**

**6) <u>Informado pri la grupaj agadoj</u>.**
**<u>FEL</u> : Marc Cuffez informas pri la ĜK en Ostendo. Jo Haazen demisiis kaj estas nova estraro. Bart Demeyere estas la nova Prezidanto (http://www.esperanto.be/fel/).**
**La financa situacio estas malbona : ni havas malprofiton de 16.000 €. La ĉefa kialo estas ke, ni ne plu vere ricevas veran subvencion. Pri la sidejo de FEL, ni atendas decidon pri du eblecoj. Ĉu aĉeti ? Institucio Hodler petas por la domo proksimume 270.000 €. Oni ankaŭ proponas alian domon en Borgerhout.**
**Sed ni nur povas ricevi donacojn se ni ricevas subvencion de la Flandra Komunumo.**

**<u>APE</u> : Marcel Delforge informas pri la kelkaj grupaj agadoj en Valonio : En Marcinelle, en Lieĝo, sed el la aliaj lokoj, malmultaj vivsignoj.**
**Nia kasistino pene riĉercas anstataŭanton (Dum la venonta APE-ĜA, Claude Glady konsentos repreni la taskon).**

Pri la revuo "Esperanto en Marche", neniu nova skipo sin proponis. En 2015, aperos do, nur informadaj Bultenoj, eldonitaj laborŝpareme de la nova kasisto.
Hubert De Meyere intencas iri al Ĉinio. (Pri tio vidu http://esperanto-wallonie.be/)

EBG : Marc Demonty informas ke, la Brusela Grupo pluvivas kun regulaj prelegoj kaj kun sufiĉe regula eldonado de la revuo Aktuala https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
Pluinstruas Françoise Pellegrin.

BEFA : Clara Bracke konfirmas ke la kursoj en la Centra Stacidomo pluokazis.

*Ĝojiga finfina Alveno de Flory !!*

EEU : Flory unue parolas pri la agadoj de EEU, kiu introdukis gravan kaj pezan dosieron pri LINGVO.INFO. Tio petis multe da laboro sed estas vera prestiĝa agado por Esperanto kun ekcepta rezulto, kiu pruvas ke Esperanto ne estas bagatela afero.
Sed necesas pruvi ĉion. La projekto estas priskribita en la Eŭropa Bulteno : http://www.europo.eu/euhropa-bulteno
EEU ricevis proksimume 300.000 €, kiujn ĝi uzis por tiu agado.
(Rim : Finfine EEU ricevis 399.328 EUR, lasta parto je la 26.03.2015, do post la ĜA de BEF)
Sed la kampanjo ne ankoraŭ estas preparita.
Kial donaci monon al Kipro ? Ekzistas grupo tie, kaj tiu donaco permesos al junuloj partopreni esperantistajn agadojn.
Kelkaj rimarkigas ke Afriko bezonas eble pli da mono.
Oni citas agadon de H. Bakker en LOME, kun alta nivelo de edukado.
Ankaŭ, agadojn de Jules Verstraeten en Kongo kaj Benino.

UEA : Flory mendis tablon por agado (ankaŭ por ILEI, BEF, Verdaj Skoltoj, ktp) dum la UK. Ĝi necesigos elektroprovizilon por la materialo.

ILEI : Marc Cuffez informas pri la venonta Konferenco en Ostendo. La informoj aperis en la Internacia Pedagogia Revuo (IPR). Ni ankaŭ intencas organizi kvartalan eventon, ĉar tiel ni povos ricevi urban subvencion.
Fakte samtempe okazos lingva festivalo : ĉiuj parolantoj de lingvoj prezentos propran lingvon, muzikon aŭ artaĵon. Eblas budo por la Verdaj Skoltoj.
Ankaŭ ni proponos ekskursojn (vidu la programon: http://www.ilei.info/ ).
Ni esperas pli ol 200 partoprenantoj. Pago eblas ĉe la konto de LA KONKO.
Necesos sendi leterojn al la ministroj pri edukado, sed estas pli bone fari tion loke.
Germain Pirlot proponos agadon pri Virinoj (?).
Espera kunlaboro kun grupo de Hiroŝima (?).

8) VERDAJ SKOLTOJ : Jean-Pol Sparenberg kaj Valère Doumont faras bildpresenton pri la celoj kaj la agadoj de tiu junula skoltmovado kaj samtempe disdonas resuman dokumenton. Ĉiuj informoj estas konsulteblaj sur la retejo de la Asocio : https://verdajskoltoj.wordpress.com/
Ili proponas ke LA VERDAJ SKOLTOJ fariĝu Fak-Asocio de BEF (Jam estas de TEJO) : Akceptita !
Por permesi plufunkciadon detiu nova "Asocio sen Profita Celo" dum la somero, necesus donaco far de BEF. Post diskuto pri la projekto kaj pri niaj eblecoj, BEF konsentas pri donaco de 4.000 €. 2.000 € pere de la FEL-konto, kaj 2.000 € pere de la UEA-konto. La kasisto de BEF Eric Baert efektivigos la pagon.


Bedaŭrinde la kunveno ne povas pludaŭri ĉar pluraj partoprenantoj devas tuj foriri kaj aperas risko ke la konstruaĵo fermiĝas pro tempa transpaso.
Do, sen diskuto, la Komitato estas malŝarĝita kaj reelektia senŝanĝe por la venonta jaro.

Venonta ĜA de BEF : la 19-an de marto 2016 en LOVERVAL.
Se iu deziras tranokti tie, estas ebleco sed necesas averti !

La Sekretario Claude Glady

# FABRIKADO DE LA BULTENO « EeM 3_2015 »

**Mi volas iomete montri kiel mi sukcesis eldoni nian Bultenon. Evidente, unue necesas trovi interesajn artikolojn por plenigi 16 paĝojn. Kelkaj paĝoj jam ekzistis en la antaŭaj numeroj : la lasta kun la informoj pri la diversaj kotizoj de APE, de Eo-Info, kaj de UEA. Du antaŭlastaj paĝoj memorigis la informojn pri la Esperanto-Movado precipe en Belgio kaj Valonio. Plie, por tiu lasta numero de 2015, mi decidis aldoni kvar paĝojn kun informoj pri la venonta UKongreso en Nitra kaj informoj el la revuo de FEL « HORIZONTAAL » rilate abonojn al revuoj kaj mendojn de libroj, por instigi al la legado!**



**La Protokolo de nia Sekretariino pri nia lasta Ĝenerala Kunveno plenigis du paĝojn kaj mi ankaŭ ricevis helpon de la Grupo de Marcinelle kaj de Marcel Delforge por verki du agrablajn legendojn pri mia regiono. Por la aliaj paĝoj, mi uzis amuzajn tabelojn de miaj elektroludoj kaj finfine skribis diversajn informaĵojn. Por la venontaj Bultenoj, mi tre esperas ricevi iom pli da helpo !**



**Por enmeti la artikolojn en mia komputilo, mi uzas la programon « PUBLISHER », kiun mi tre uzas kaj tre ŝatas. La originala laboro estas farita en formato A4 po unu paĝo. Kelkaj paĝoj povas esti tiel rekte skribitaj per Publisher en la bona formato, sed kelkfoje mi devas enmeti bildojn en formato « jpg » aŭ uzi tekstojn en formato « pdf ».**


**Sekvanta etapo permesas obteni la Bultenon kun paĝoj en formato A5 : du paĝoj A5 sur unu A4.**

**Sed mi devas esti singarda ! Sur la unua folio A4, ekzemple, mi devas meti paĝon 1 dekstre, kaj paĝon 16 maldekstre, ambaŭ antaŭflanke, kaj paĝon 2 maldekstre, paĝon 15 dekstre, ĉifoje ambaŭ dorsflanke. Kontrolu vi mem, tio estas malfacile videbla sed esenca. Alia neceso, mi devas mallarĝigi la artikolojn ĝis precisaj marĝoj pro la venonta**




**Nun, mi povas presi la 14 paĝojn de la Bulteno. Sed, ĉar mi povas presi nur unu flankon de la folio, mi devas kontroli, ke mi havas la taŭgan antaŭflankan paĝon kun la dorsflanka. Por la tuta Bulteno, necesas presi 4 foliojn ambaŭflanke, do 8 presadojn. Mi decidis eldoni 80 Bultenojn. Signifas ke mia printilo funkciis do 640 fojojn. Poste, kun 4 pakaĵojn de 80 folioj sur la tablo , mi komencis kunigi libretojn po 4 folioj en la bona ordo, kaj agrafis ilin. Poste, por obteni revueton en formato A5, necesas konvene faldigi ĝin.**








Mi decidis sendi la Bultenon per normala  kuriero de la Poŝto, tiel ke mi rajtu uzi  normalan poŝtmarkon .  Efektive, mi ne intencas eldoni regule kaj do ne rajtas uzi favoran prezon por la sendado kiel aliaj grupoj.




Por obteni tiun rajton uzi normalan poŝtmarkon, la Bulteno devas esti maksimume rektangulo  kun precisaj dimensioj : kun A5 folio, la larĝeco estas bona sed mi  devas tranĉi iom de la alteco.
Por tio, necesas uzi  prudente mantranĉilon.









Por tiu lasta Bulteno de la jaro,  mi decidis aldoni ĝirilon kun la kontnumero de APE por ke ĉiu pensu kaj povu facile rekotizi.  Mi esperas monan rezulton !
Lastan uzon de la agrafilo por  aperigi la Bultenon kiel sendeblan leteron.
Listo de la diversaj adresoj  ekzistas  en mia komputilo per datuma programo ACCESS :  adresoj de membroj, de senpagaj sendoj por informi aliajn grupojn kaj niaj aŭtoritatuloj, kaj bedaŭrinde ankaŭ memorigaj sendoj por instigi eksajn membrojn rekotizi) .
Tiu programo permesas obteni presadon de memglueblaj etikedoj sur  speciala  papero.
Kia agrablaĵo ke mi ne devas mane skribi  ĉiujn adresojn.  Kaj tio aperas pli serioza !
Lasta etapo :  Surglui poŝtmarkojn por Belgio kaj por eksterlando.
Miaj 71 finpretaj Bultenoj nun povas esti metitaj en la poŝtkesto.
Fino de tiu laboro .   Uf ! …
Ĝis la sekvanta Bulteno EeM 1_2016.

La nevolema sed devigema eldonisto  Claude GLADY

# PEKO 2016
# Printempa Esperanto-Kongress

De la 4a ĝis la 8a de majo 2016



**Ni kunvenos en la Kultura Centro "La Marlagne".**
**Ĝi estas je kelkaj kilometroj de Namuro, ĉefurbo de Valonio.**
**(Centre Culturel "La Marlagne"   26, Chemin des Marroniers  5100 Wépion)**

## Kotizoj

**La kotizo inkluzivas manĝojn, tranoktadojn, littukojn, programon, la spektaklojn, la aĵojn por la manfarado, kaj unu ekskurso.**
**Akvo, kafo kaj teo estas senpagaj. La aliaj trinkaĵoj estas pagendaj.**

***POR PLENTEMPA PARTOPRENADO***

| Aliĝo ĝis la | 1a de januaro | 1a de februaro | 1a de aprilo |
|---|---|---|---|
| bebo | 0 | | |
| ĝis 18 jaroj | 125 | | |
| Ĝis 25 jaroj | 150 | 160 | 180 |
| Ekde 26 jaroj | 160 | 180 | 200 |

BN : Aĝo je la komenco de la kunveno .   **PAGU al konto de VS :  BE25 9731 2584 2982**

## Ĉambroj :

**Bazaj ĉambroj estas tri litaj kun unu etaĝa lito. Lavujo estas en la ĉambro.**
**Ankau eblas logi en 2 dulitaj ĉambroj.  Duŝejoj kaj necesejoj estas trans la koridoro.**

- **aldono por dulita ĉambro: 40€ por persono**
- **rabato por la kontribuanto laŭ interkonsento**
- **rabato por familio (ekde 3 infanoj): 50€ por familio**

***POR PARTA PARTOPRENADO***

- **Tago kun tagmanĝo, vespermanĝo kaj programo   50 €**
- **Tranoktado kun matenmanĝo   30 €**

**Libro-servo :** **Ni havos la ŝancon gastigi la libro-servon de FEL!  Do vi povos trovi ĉiujn novaĵojn, librojn, diskojn, ktp.  Jam esploru ĝia katalogo kaj antaŭmendu la librojn  kaj diskojn kiuj interesas vin!   http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php**

## KASTELO DE GREZILLON (BAUGE 49)

**8-16 aprilo 2016 : 6-a PRINTEMPaS**

**20-24 aprlo 2016 : Korusa renkonto de Interkant**

# INVITILO por la 68-a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

**Varna, Bulgario,**

**de la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016**

## ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ,

**La bulgaraj fervojistoj, esperantistoj, tutkore invitas vin partopreni la 68-an kongreson de IFEF, kiu okazos de la 21-a ĝis 28-a de majo 2016 jaro proksime al urbo Varna - la mara ĉefurbo de Bulgario. Nia federacio akceptas organizi por 5-a fojo IFEF Kongreson. La esperantistoj, kiuj vizitis la kongresojn en Varna – 1968 jaro, en la turisma ripozkomplekso "Suna Bordo" – 1984 jaro, en Plovdiv – 2002 jaro kaj en Sofio – 2010 jaro memoras la agrable travivitajn tagojn en Bulgario.**

**Ni esperas, ke denove ni sukcesos kaj vi estos kontentaj pro nia gastamo.**

**Ni atendas vin senpacience amase viziti la kongreson.**

**Adreso de LKK: inĝ. Veselka Kamburova (68-a IFK)** **Retadreso: bg_68ifk@abv.bg**
**z k "Obelya-2", bl. 209/A/5 1326 - Sofio, Bulgario** **Tel: +359 887090163**

## Kongresa bankokonto:

**First Investment Bank, SOFIA 1233, ul. "OPALCHENSKA" № 117**
**IBAN: BG38FINV91502016206231, BIC: FINVBGSF**

**Bonan venon en Varna!**

# 101-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**Nitra Slovakio**

**23—30 julio 2016**

| KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en eŭroj) | ĝis 31 dec. 15 1-a periodo | | ĝis 31 marto 16 2-a periodo | | ekde 1 aprilo 16 3-a periodo | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A | B | A | B | A | B |
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG): | 180 | 135 | 225 | 170 | 270 | 205 |
| 2. ne individua membro de UEA | 225 | 170 | 280 | 210 | 340 | 255 |
| 3. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA | 90 | 65 | 115 | 80 | 135 | 95 |
| 4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA | 135 | 100 | 170 | 125 | 205 | 150 |

# BLEKOJ : Cris d'animaux

**AGLOBLEKI : L'aigle glapit ou trompette**
**AZENOBLEKI : L'âne brait**
**ALAŬDOBLEKI :**
**L'alouette tirelire ou turlute**
**BALENO BLEKI :**
**La baleine mugit ou chante**
**SKOLOPOBLEKI : La bécasse croule**
**MUSTELOBLEKI : La belette belote**
**VIRŜAFOBLEKI : Le bélier blatère**
**BOVOBLEKI :**
**Le bœuf beugle ou meugle**
**BUBALOBLEKI :**
**Le buffle beugle ou souffle**
**KOTURNOBLEKI :**
**La caille cacabe, carcaille ou margote**
**ANASOBLEKI:**
**Le canard cancane ou nasille**
**CERVOBLEKI : Le cerf brame ou rait**
**KAMELOBLEKI : Le chameau blatère**
**KATOBLEKI : Le chat miaule**
**VESPERTOBLEKI :**
**La chauve-souris grince**
**ĈEVALOBLEKI : Le cheval hennit**
**KAPRINOBLEKI**
**La chèvre béguète, bêle ou chevrote**
**KAPREOLOBLEKI : Le chevreuil rée**
**HUNDOBLEKI: Le chien aboie ou jappe**
**STRIGOBLEKI au NOKTUOBLEKI:**
**La chouette hulule ou chuinte**
**CIKONIOBLEKI :**
**La cigogne glottore ou claquette**
**PORKOBLEKI :**
**Le cochon grogne ou grouine**
**VIRKOKOBLEKI :**
**Le coq chante, coqueline ou coquerique**
**KOVOBLEKI : Le corbeau croasse**
**KORNIKOBLEKI**
**La corneille graille, craille ou criaille**
**AKRIDOBLEKI : Le criquet stridule**
**KROKODILOBLEKI :**
**Le crocodile vagit, lamente ou ancoule**
**CIGNOBLEKI : Le cygne trompette**
**MELEAGROBLEKI :**
**Le dindon glougloute**
**ELEFANTOBLEKI : L'éléphant barrit**
**STURNOBLEKI : L'étourneau pisote**
**FAZANOBLEKI : Le faisan criaille**
**CERVIDOBLEKI : Le faon râle**
**GAROLOBLEKI : Le geai cajole**
**RANOBLEKI : La grenouille coasse**
**GRUOBLEKI :**
**La grue glapit, craquette ou craque**
**OTUSOBLEKI :**
**Le hibou hue, bouboule, ou tutube**
**HIRUNDOBLEKI : L'hirondelle trisse**
**UPUPOBLEKI : La huppe pupule**
**HIENOBLEKI : L'hyène ricane**
**VIRANSEROBLEKI : Le jars jargonne**
**KUNIKLOBLEKI :**
**Le lapin couine ou clapit**
**LEONOBLEKI : Le lion rugit**
**LUPOBLEKI : Le loup hurle**
**MARMOTOBLEKI : La marmotte siffle**
**MERLOBLEKI : Le merle flûte**
**PAUOBLEKI : La mésange zinzinule**
**PASEROBLEKI : Le moineau pépie**
**ŜAFOBLEKI : Le mouton bêle**
**ANSEROBLEKI : L'oie cacarde**
**URSOBLEKI : L'ours grogne**
**PAVOBLEKI : Le paon braille**
**KONUROBLEKI : La perruche jabote**
**PIGOBLEKI : La pie jacasse**
**KOLOMBOBLEKI : Le pigeon roucoule**
**FRINGOBLEKI : Le pinson ramage**
**NUMIDOBLEKI : La pintade cacabe**
**KOKINOBLEKI : La poule glousse**
**RATOBLEKI : Le rat gouine**
**VULPOBLEKI : Le renard glapit ou jappe**
**RINOCEROBLEKI : Le rhinocéros barrit**
**NAJTINGALOBLEKI :**
**Le rossignol gringotte**
**APROBLEKI :**
**Le sanglier grogne, nasille ou grommelle**
**SIMIOBLEKI :**
**Le singe crie, hurle ou piaille**
**MUSOBLEKI : La souris chicote**
**TIGROBLEKI : Le tigre feule ou rauque**
**TURTOBLEKI :**
**La tourterelle gémit ou caracoule**
**ZEBROBLEKI : Le zèbre hennit.**

# INFORMOJ PRI ESPERANTO

## BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Prezidantino :** | S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) | 059 702 914 | flory2@witdoeckt.be |
| **Sekretario :** | S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) | 071 644 916 | cglady@arcadis.be |
| **Kasisto** | S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) | 02 384 82 23 | baert.eric@skynet.be |

**BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.**

## ASOCIO POR ESPERANTO (APE)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Honora Prezidanto :** | Marcelle DELFORGE | 071 431 413 | mardelforge@brutele.be |
| **Prezidanto :** | Georges SOSSOIS | 071 436 205 | georges.sossois@gmail.com |
| **Sekretariino :** | Bernadette PONCELET | 087 398 570 | bernadetteponcelet@skynet.be |
| **Kasisto :** | Claude GLADY | 071 644 913 | cglady@arcadis.be |
| **Eventoj :** | Valère DOUMONT | 0485 517 552 | doumontvalere@yahoo.fr |
| **Promocio Eo :** | Hubert DEMEYERE | 071 502 691 | hubert.demeyere@gmail.com |
| **Interreto :** | Patrice VAN DE VELDE | 0478 251 419 | patrice.vdvelde@gmx.com |
| **Disvastigado :** | Guy BASYN | 010 688 282 | guy.basyn@skynet.be |

## FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Frankrijklei 140 (2000 Antwerpen) 03 234 34 00

info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

Vi povas mendi librojn en la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php

## BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

| | | | |
|---|---|---|---|
| Françoise PELLEGRIN | (Rhode-St-Gebèse) | 02 358 27 28 | franaz@esperantobruselo.org |
| Nikolao de BUYL | (Koekelbergh) | 0478 382 981 | nikolao@esperantobruselo.org |
| Laurent LOISSE | sekretario@esperantobruselo.org | | www.espernantobruselo.org |

La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/

## VERDAJ SKOLTOJ asbl.

**[www.verdajskoltoj.net]** **info@verdajskoltoj.net**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Pol SPARENBERG | Prezidanto | 0475/27 23 19 | jpsparenberg@gmail.com |
| Valère DOUMONT | Sekretario | 0485/51 75 52 | doumontvalere@yahoo.fr |

Subteno al konto de V.S. : **BE25 9731 2584 2982** Ruelle de Thuin 20 B-6540 LOBBES

## GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825

Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h

***INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES***

| | | | |
|---|---|---|---|
| **UEA :** Nieuwe Binnenweg 176 | NL-ROTTERDAM | +31 10 436 1044 | www.uea.org |
| **SAT :** Av. Gambetta, 67 | FR-75020 PARIS | +33 9 50 71 01 97 | www.satesperanto.org |
| **SAT-AMIKARO :** Bd Vincent Auriol, 132 | FR-75013 PARIS | +33 9 53 50 99 58 | www.esperanto-sat.info/ |

Ĉiuj informoj en franclingva Belgio ĉe Claude GLADY :

rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

# INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

## CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Rudy COGNIAŬ | (Châtelet) | 0492 710 974 | rudycogniaŭ@swing.be |
| Mireille MARNETTE | (Marcinelle) | 071 324 733 | marnette.mireille@skynet.be |

## LIEGE-ESPERANTO asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| Denise MAILLET | (Embourg) | 04 365 15 23 | denise.dupont@skynet.be |

## LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| André DEMARQUE | (Wavre) | 0486 516 085 | ademarque@skynet.be |

## VIRTON : GAUME ESPERANTO

| | | |
|---|---|---|
| Gaby SIMEON | (Saint-Mard) | 063 571 204 |

## SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Marie JACQUES | (Verviers) | 087 330 292 | jacques@senlime.org |
| Jose JACOB | (Polleur) | 087 221 079 | |

**http://www.senlime.org/** **Revuo libere elŝutebla : http://www.senlime.org/Info/zipLasta.zip**

## KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

Mathieu SCHRYMECKER (La Calamine) 087 853 389

## AUTRES VILLES WALLONNES

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **ATH** | Monique VAN ROY | (Ellezelles) | 068 542728 | |
| **BINCHE** | Maxime LECHIEN | (Vellereille) | 064 337 826 | |
| **CERFONTAINE** | Claude GLADY | (Cerfontaine) | 071/644 916 | cglady@arcadis.be |
| **COMINES** | J-C THUMERELLE | (Warneton) | 056 557 606 | jcthum@gmail.com |
| **DINANT** | Maurice WOUTERS | (Onhaye) | 082 644 635 | eo.wm.5520@skynet.be |
| **GEMBLOU** | José VINCK | (Gemblou) | 081 613 016 | |
| **MONS** | Edith COLAS | (Saint-Symphorien) | 065 313263 | |
| **NAMUR** | René PAIROŬ | (Malonne) | 081 460 594 | rene.pairoŭ@scarlet.be |

## KOMUNIKADO asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| Denis FLOCHON | (Namur) | 081 743 853 | info@komunikado.be |

## SITE INTERNET D'APE

**Respondeculoj** : <patrice.vdvelde@gmx.com> kaj <hubert.demeyere@gmail.com>

http://esperanto-wallonie.be/ http://esperanto-wallonie.be/fr/esperanto-en-marche-fr

## BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

**Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]**

## ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

### COTISATIONS POUR APE EN 2016

- **MEM : Pour être membre de APE : 10 €**
- **BUL : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €**
- **FAM : Membre supplémentaire de la famille : 3 €**

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1**
**de l'Association pour l'Espéranto (APE).**
**NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €**

## ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 20 €

**Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)**
**Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947**
**Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »**
**Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »**

| Kodo | Universala Esperanto Asocio: UEA 2016 | | Ricevas |
|---|---|---|---|
| SA | Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA. | 41 € | Revuon "ESPERANTO" sen membreco ! |
| Kto | Abono al "KONTAKTO". | 25 € | Revuon "KONTAKTO" |
| MJ | Membro UEA + "Jarlibro" | 26 € | "JARLIBRON" |
| MJ-T | Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl. | 26 € | Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA | Membro Abonanto (MJ + SA) | 64 € | Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA-T | Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl. | 64 € | Kiel MA plus "KONTAKTO" |
| MG | Membro UEA+"Gvidlibro" | 11 € | "GVIDLIBRO" |
| PT | Patrono de TEJO | 78 € | la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco |
| SZ | Societo Zamenhof | 128 € | Mecenata subteno sen membreco. 12 |
| DM | Dumviva membro de UEA (25xMA) | 1.600 € | Dumviva MA |

**Bonvolu pagi al la konto de la peranto**
**por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :**

**BE50 750-6373051-18**

**je la nomo de :**
**GLADY Claude Rue du Culot, 1**
**B-5630 CERFONTAINE**

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

**BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA…**

**La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !**

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

**BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :**
**Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto**